

Dumonata esprimilo eldonata de **Amika Esperanto-Rondo**
 Redaktejo : Esperanto, F 47470 BEAUVILLE
Abono en Eŭropo : 60 FF. Ekstereŭrope : 80 FF
Speciala abono por nepagipovaj landoj : 40 FF
 Ĝiri al : CERCLE AMICAL ESPERANTISTE
 Pĉk : 3371.74 M. Bordeaux (mencii same sur bankĉekoj!)

Jen la 105a numero, sen la kutima debato, sed kun plej diversaj eroj :

- p.2, L! plezure reklamas pri tradukverko de laŭtulo Edgard Jamart.
- ekde p.3, "Ĉies voĉoj" liveras multajn debatemojn per plimalpli pikaj artikoloj.
- p.13, la rendevuo kun nia maljuna amiko Valo.
- p.19, Lina Gabrielli rakontas pri amo... ne sufiĉe reciproka.
- p.21, Suzanne Boniol atentigas vin pri... via nazo kaj la odoroj kiuj povas trafi ĝin.
- p.27, Hagen Hirte fabelas...
- p.30, Michèle Freud transportas vin en la mirigan mondon de araneoj.
- p.32, R. Grzela... al Litovio.
- p.33, vojaĝu al la nekonata instruo de Ouspensky dank'al lia felietona kompilinto Ergoto de Bonaero.
- p.41, ni revenu al nia hobbio, Esperanto. Cleber Lemos esploras unu el ĝiaj multaj anguloj.

Meze, la adresaro de **Laŭte!** helpos vin konatiĝi kun la nuna laŭtularo floranta en 38 landoj.

Ĉu, tia kia ĝi estas, **Laŭte!** plaĉas al vi ?

Ĉu jes ? Restas "loko" por pluraj dekoj da novaj abonantoj.
 Ne hezitu varbi inter viaj konatoj !

ĈIES VOĈO

ISLAMO, ĈU EKSTREMISME DEKSTRA RELIGIO ?

Por multaj legantoj de *Laŭte* povas aspekti stranga tiu demando asocii religion kun ekstremisma formo politika dekstra. Eble la tradiciaj katolikoj de Monsinjoro Lefevre, sed la Islamanoj ? Ili estas enmigrintoj kaj supozeble favoraj al la maldekstraj partioj, kaj precipe egaj malamikoj de S-ro Le Pen (estro de la franca naciista partio Nacio Fronto). Jes, tio estas vera, sed tio ne signifas, ke ili mem havas pensmanieron tute malsaman de tiu de la faŝistoj.

Kial ?

Ĉar ekzistas de praj tempoj du kontraŭaj ideologiaj ondoj en la mondo, cetere ne nur ideologiaj sed ankaŭ vivokonceptoj, vivoformoj. La religioj, kiuj estas sanktigitaj ideologioj kaj tiel la plej egaj ideologioj, ne povas eviti tiun apartenon al iu aŭ alia grupo.

La unua grupo akceptas la mondon tia, kia ĝi estas. Maksimume ĝi strebas aranĝi ĝin por vivi tiom komforte kiom eble en ĝi, sed ĝi tute ne celas aliigi ĝin, ĉar por ĝi la mondo - aŭ kosmo-ordo - estas tiom perfekta kiom eble, ĝi devas esti respektata kaj estus danĝere kaj sakrilegie intenci modifi ĝin. Tiu ideologia grupo estas konservativa kaj sekve dekstra. Komprenoble, estas nuancoj, estas homoj, kiuj ĝis-ekstreme kultas tiun pensmanieron, kaj aliaj, kiuj estas multe pli moderaj.

La dua grupo opinias, ke la mondo estas malĝusta kaj maljusta, tute malperfekta ; oni nepre devas plibonigi ĝin, aliigi ĝin por irigi ĝin al perfekteco. Komprenoble, estas necese ribeli kontraŭ la ekzistanta ordo por renversi ĝin kaj anstataŭigi ĝin per alia, pli bona. Tiu grupo opinias havi progresemajn ideojn kaj ĝi estas maldekstra.

Male, la monoteismaj religioj Judismo kaj Kristanismo estigis revolucion de la pensmaniero spiritala. La Judismo esperas la alvenon de la Mesia tempo, kiam la mondo atingos stadion de plena perfekteco, kaj la Kristanismo en la Evan-

Tradukisto el Esperanto al la Franca:

EDGARD JAMART

Thonissenlaan 63/15
B-3500 Hasselt
Belgio

Klera esperantisto el Belgio, Edgard Jamart tradukas en francan el Esperanto, verkojn de Evaldo Pauli, Prezidanto de Filozofia Asocio Tutmonda.

Les sentiers sinueux de la connaissance - Du doute et de la certitude estas la nova longa titolo de la Esperanta verko **Pri dubo kaj certeco**. Ĝi aperis ĉe ACADEMIA, Editions et Diffusion, 42, Passage de l'Ergot - B-1348 Louvain-la-Neuve, Belgio.

Jam alia verko estas tradukita al la franca, fare de Edgard Jamart: **De Jésus à Jean de Salisbury - Mille ans de philosophie chrétienne**, nova titolo de la Esperanta verko de Evaldo Pauli: **Mil jaroj de kristana filozofio**.

Ĉar tiuj verkoj estas pri filozofio, la koncernaj tradukoj de S-ro Edgard Jamart faras gravan servon al la esperantista filozofia movado. Cetere, por la lingvo Esperanto, ĝi ankaŭ signifas, ke la Internacia Lingvo servas kiel ponto facila por la individua aŭtoro al multaj landoj.

Oni povas mendi "**Pri dubo kaj certeco**" rekte ĉe la eldonejo :
ACADEMIA-ERASME, s.a. , Grand'Rue, 25/115,
B - 1348 LOUVAIN LA NEUVE (880 FB + sendkosto)

gelioj anoncas la alvenon de nova mondo kaj de "nova homo". Tio estas tute progresema mondokoncepto kaj tute maldekstra. La komunistoj esperis (as) "la grandan vesperon" kaj oni multe parolis pri la "nova homo" t.e. klera, konscia pri siaj devoj, respondeca homo, kiun la socialisma vojo devis krei. Tio eksplikas kial eminentaj kristanoj estis kelkafoje tiom allogitaj de la marksismo, kaj ankaŭ kial kelkaj marksistoj, kvankam tute ne religiaj kredantoj, interesiĝis pri la kristanismo. Kaj pro la sama motivo ekzistis Judoj, aŭ homoj de juda deveno, kiuj estis fervoraj marksistoj.

Cetere la aferoj ne estis tiom simplaj sed multe pli kompleksaj, ĉar la Kristanismo fariĝinte instalita religio, intencis konservi siajn privilegiojn, kaj fariĝis konservema kaj kelkafoje eĉ tre : Sekve, la revoluciaj kaj laboristaj movadoj, kiuj intencis renversi la instalitan ordon, fariĝis kontraŭkristanismaj kaj kontraŭreligiaj. Sed, se oni legas ilin bone, la Evangelioj estas revolucia verko, kaj cetere eĉ ribelante kontraŭ la kristanismo, la maldekstraj politikaj partioj kaj movadoj estis nekonscie aŭ subkonscie tre stampitaj de ĝi.

Male, la marksisma ideologio neniam multe allogis la Islamanojn, sed tio estas tute logika. Nome Islamo signifas submetiĝon (je la Dia volo t.e. la kosma ordo) kaj Islamo devenas de la sama radiko kiel salam-o, kiu signifas pacon. Islamo estas la mensa, spirita paco, kiun konas malribelulo tute submetita je la Dia volo, je la instalita ordo, natura, kosma kaj socia. Tiaj homoj ne povas esti progresemuloj aŭ maldekstruloj. Ili estas konservemaj kaj eĉ treege, ĉar la Korano postulas plenan kaj senhezitan submetiĝon je Dio. La de la revelaciita libro fiksitaj vivoformoj estas netuŝebla, neŝanĝebla Fundamento poreterne. Sed bedaŭrinde la Ŝario (leĝa Fundamento de Islamo) estas multe malpli fleksebla, allasas multe malpli da libera kampo por interpretado ol la Fundamento de Esperanto. Eĉ la Okcidentaj faŝistoj havas klare pli malferman kaj adaptiĝeman menson. Ĉerte okazas (is) ribeloj en Islamujo pro mizero, ili ne celas novan socian formon, sed revenon al la pura instruado de la profeto kaj sekve returnon al praa sociordo.

En Okcidento nur Hitlero iel trafis al starigo de simila rigideco de la sociordo kaj de la menso. Cetere la nazioj diris:

"La Germanaj vivoformoj estas fiksitaj por la venontaj mil jaroj". Kelkaj kleraj nazioj admiris la Islamon, ĉar siamaniere ĝi estis idealo kaj vivomaniero, kiu pro sia totalismo havis evidentajn similaĵojn kun ilia propra. Himmler diris : "Religio, kiu promesas paradizon al mortintaj batalantoj, ne povas esti malbona religio." En sia libro pri la nuna islama mondo "**La militistoj de Alaho**" la germana ĵurnalisto Peter Scholl-Latour aludas pri la fakto, ke post la milito, elrevigitaj nazioj konvertiĝis je Islamo kaj fariĝis fervoraj Islamanoj.

Oni tamen ne troigu, la Islamo estis multe pli tolerema ol la naziismo. La Kristanoj kaj la Judoj estis kiel Ahl al Kitab (homoj de la libro) tolerataj, kvankam kun malsupera statuto. Nur la paganoj estis destinitaj al ekstermo, sed ili havis la eblecon konvertiĝi. La Araboj kondukis kelkafoje rasisme, sed por profeto Mahometo la raso havis neniun gravecon, nur la islama pieco gravas, kaj la Islamo principe ne konas rasismon, almenaŭ interne de sia komunumo. Pro tia toleremo kaj la konkerado de vastega imperio, Islamo starigis brilegan kaj unuarangan civilizacion, kiun nun nostalgie rememoras kaj alspiras la nuntempaj Araboj.

Kaj la "Nacia Fronto" ? Ĝi iel tre similas la Islamon. La nacifrontanoj volas restarigi "la naturan ordon" kaj submetiĝi je ĝi. Kaj kiam S-ro Le Pen diras : "Mi preferas mian filinon ol mian kuzinon, kaj mian kuzinon ol fremdulinojn", li (verŝajne) tute senscie ripetas preskaŭ laŭvorte la parolojn de profeto Mahometo pri hereda demando. Kaj same kiel la Islamo la Nacia Fronto ne konas rasismon interne de la propra komunumo (sed ne ekstere). La similaĵoj estas okulfrapaj.

Tio estas maltrankviliga, ĉar la Islamanoj estas pli kaj pli multnombraj en Franclando kaj en Eŭropo. Oni povas nur esperi, ke ili perdos la fervoron islaman. La tasko de la progresemuloj estas helpi ilin, kiom ajn estu la kosto, integriĝi en la okcidenta sociordo kaj forgesi la Islamon aŭ almenaŭ tre mildigi ĝin, por ke ĝi restu nur kiel postsigno de ilia deveno.

BORVO

Pri la mainova aserto "NASKIĜLANDO DE ESPERANTO"

dediĉe al Igorj kaj Remigiusz

En L!102 Remigiusz Grzela prezentis la samideanojn Zamenhofo, Grabowski kaj Kabe sub la titolo "La Naskiĝlando de Esperanto" - Polujo. "Ĉiu Esperantisto scias, ke la naskiĝlando de Esperanto estas Pollando, sed ne ĉiu Polo." Ankaŭ Igorj en L!103 ne sciis tion, rimarkante ke Polujo 1887e ne ekzistis, kaj ke Esperanto ja ne estas "frukto de polaj kulturo, menso-stato, spirita vivo." Reis Remigiusz en L!104, ke

1e "Zamenhof (...) sentis sin Polo(j)"
 2e "en koroj de Poloj Pollando ĉiam ekzistis"
 3e "Esperantologio ja instruas, ke Polo kreis Esperanton, kaj ke la lingvo naskiĝis en Pollando"

"Celo de" la artikolo de Remigiusz "ne estis disputo ĉu Pollando estis naskiĝlando de Esperanto," sed ŝajnas, ke la temo lin forte kortuŝas.

Permesu al mi fari notojn pri la supraj citoj.

1e. "Ĉu Zamenhof estis pola okulisto?" demandis Bernard Golden el Hungarujo en **PACO** 1988 (GDR) listigante literaturajn rimarkojn tiucele. Mi citas el Golden: "Okulisto? Jes. Pola Ne! (...) En letero al (LKK) en Krakovo la 14-an de februaro 1912, Zamenhof skribis: 'Ne nomu min polo por ke oni ne diru, ke mi - por akcepti honorojn - metis sur min maskon de popolo, al kiu mi ne apartenas... laŭ mia deveno mi alkalkulas min al la gento hebrea.'"

2e. Post la Tri Partigoj de Polujo ĝi reestiĝis sub Napoleono en Grandduklando de 1807. Ekde 1815 ĝin regis la Caro en "personunio". Pro la revolucio de 1830/31, Nikolao I faris ĝin provinco, Aleksandro II post la ribeloj de 1863 (kiun Zamenhof spertis kiel knabo) partigis ĝin en 10 guberniojn. Ĝi estis ne Pol(a)lando. La koroj de homoj ŝanĝis tion ne. (1916, unu jaron antaŭ la morto de Zamenhofo, germanaj okupantoj proklamis Polan Reĝolandon).

3e. Laŭ Detlev Blanke, "Internationale Plansprachen" 1985, ekzistas pli ol mil planlingvo-projektoj. Kelkaj akiris rangon de duonplanlingvoj (Volapük k.a.), kaj nur Esperanto estas vere planlingvo. Kial? Lingvo ne komenciĝas kun publikigo. Por fari lingvon, necesas da (Blanke listigas detale kaj en bona ordo) organizaĵoj, gazetoj, literaturo tradukita, mema literaturo, fakliteraturo, kongresoj, junulara movado ktp. - ĉu tio

ĉio okazis en Varsovio 1887e? Mi eltiras de "Vivo de Zamenhof" de Edmond Privat (1957): "La unua libreto (t.e. de E-o) aperis en la rusa (!) lingvo. Baldaŭ poste sekvis eldonoj pole, france, germane, angle." (p.51), (en Varsovio Zamenhof) kun edzino (...) komencis dissendon de l' broŝuro al gazetoj kaj personoj ĉiulandaj." (p.52) kaj multaj aliaj ekzemploj montras la dekomencon internaciecon de Esperanto, sen kiu ĝi ne estus "Lingvo Internacia" (tiel ja ĝia originala nomo).

La bedaŭrindan aserton, ke Polujo estus "Naskiĝlando de Esperanto" ni ja konas ankaŭ el publikaĵoj de Polaj asocioj. Ŝajnas al mi, ke la aserto "Zamenhofo estis aŭ sentis sin Polo" venas aŭ de Polaj Esperantistoj por plivalorigi Esperanton aŭ de ne-Polaj- ne-Esperantistoj por malplivalorigi Esperanton. (Aŭ de personoj, kiuj timas al iuj malbonan reputacion de gento hebrea.)

Oni tie ĉi vidas, kiun de-baton tia naciisma stultaĵo povas semi inter nin.

Korbeto
en aprilo 1993.

DEMOGRAFIO

(Vd. L! 104)

*Pro sia ĉeftemo "Demografio" aparte interesis min la lasta numero de **Laŭte**, precipe la artikolo, kiun verkis nia bedaŭrata Amiko Ludoviko.*

Li tute prave rimarkigis, ke la ekologioj, kvankam ili bone scias, ke la plej danĝera predanto de la naturo estas la homo, komplete silentas pri la homplimultiĝo.

Videble tiuj ekologioj ne interesiĝas pri la naturdetruoj en la tria Mondo, kaj ne legis verkojn de René DUMONT (mondkonata agronomo kaj filozofa) kiu, jam de longe, alarmas pri la katastrofa kresko de la loĝantaro, kiu, en tiu mondparto, ĉefe en Afriko, kondukas al dezertiĝo, mizero kaj malsato.

Ne eblas citi ĉiujn librojn kiujn, pri tiu temo, verkis René DUMONT, sed al la franclingvanoj mi rekomendas la legadon de "Pour l'Afrique, j'accuse", kolekto "Terre Humaine" PLON.

Kelkaj nombroj, kiujn li donas, estas pripensigaj.

... La loĝantaro, en tuta Afriko, kreskis de 219 milionoj en 1950 ĝis 285 milionoj en 1960, kaj 551 milionoj en 1985. La jara kreskoritmo, kiu estis 5 milionoj komence de tiu periodo, nun atingas 15 milionojn... Laŭ la prognozoj de UNO, de 500

milionoj en 1980, la logantaro en tuta Afriko triobligos kaj atingos 1,5 miliardojn en 2025... se giganta malsato aŭ epidemioj, aŭ se senkompataj "modernaj" militoj ne draste reduktos tiun kreskon.

Tio, kio validas por Afriko, validas ankaŭ por Azio kaj Sud-Ameriko. Kvankam, ĉefe en Azio, la instancoj de pluraj el la tieaj grandaj landoj, konsciaj pri la danĝero de tiu situacio, provas limigi la naskadon de siaj samlandanoj.

Ni, kiuj plejparte vivas en la "okcidenta" mondparto, tie, kie la praloĝantaro estas stabila, ne povas resti indiferentaj rilate al tiu antaŭvidebla katastrofo. Unue, ĉar temas pri homfratoj. Due, ĉar neeviteble ni estos nerekte trafitaj.

Tute normale, homoj, kiuj daŭre malsatas en sia propra lando, sen espero pri pli bona estonteco, provas aliri industriajn landojn, esperante tie labori kaj fine satmanĝi. Multaj el ili venigas siajn familianojn.

Tradicie, la afrikaj familioj kutimis/as naski multajn idojn por kompensi la perdon de tiuj, kiuj junaĝe mortas. Nun, almenaŭ kiam ili ne mortas pro malsato, dank'al la progreso de la sanitaraj rimedoj, feliĉe (?) ili pli multnombre atingas la plenkreskan aĝon. (Mi lokis demandosignon post 'feliĉe', ĉar mi krude demandas min ĉu estas pli bone malsatmorti dudek-jara ol nur unujara ?)

Neniu riproĉo povas esti farita al ili, ĉar ili ne estis/as edukitaj por limigi la nombron de infanoj, kiujn tiuj familianoj naskas, kiel, cetere, niaj gepatroj, se ne la plej aĝaj nuntempaj generacioj, aŭ la religiemuloj.

La grandaj eklezioj kulpas pri tiu eksploda situacio. Ili daŭre predikas "kresku kaj multobliĝu" kaj, evidente, kontraŭas al la uzo de kontraŭnaskrimedoj.

G. Lebec

SPRONI LA BALOTEMON...



Iam oni elpensis por politiko la terminojn "dekstra - maldekstra". Dum jardekoj sub tiuj standardoj ekscitiĝis sufiĉe da balotemuloj por ke ili plu emu partopreni en la "demokratia" vetludo. Nun, kiam la vortoj socialismo-komunismo nenion plu kredindan signifas, la "programoj" de dek-

tro kaj de maldekstro mirige similas unu la aliajn, kiujn spronajn vortojn elpensas la adeptoj/profitantoj de balota demokratio por mobilizi la voĉdonantojn ?

LAŬDO AL PARTIA MALSUKCESO

Se vi estas subtenanto de politika partio (aŭ ĉu ĉefe se?), eĉ la unuavide plej humana kaj idealismema, preĝu ke ĝi neniam ekregu la landon !

Ĉar pripensu jenon : En niaj demokratioj, kie laŭdire regas la plimulto, povas ekregi nur la partio, kies promesoj plej plaĉas al la plimulto. Ĉu la plimultaj balotrajtanoj estas ĉiam la plej prudentaj ? Tion oni povus ekzameni, ĉu ne ? Ili estas statistike certe ne la plej kleraj, sed ĉu klero naskas prudenton, ankaŭ tio estus ekzameninda, ĉu ne ? Nu, ĉiuj balotantaroj en la mondo jam delonge konstatis, ke estas grandega abismo inter la promesoj kaj la efektivaj faroj. Evidente. Partio povas pluki voĉdonojn nur se ĝi promesas kion esperas la balotantoj. Se ĝi krude diras la veron, ĝi nepre ne estas subtenata. Neniu partia sukceso sen demagogio. Do, karaj geamikoj, timu la sukceson de "via" partio!

FOR LA LABORON !

Jam de sia apero sur la tero la besto, kiu mem nomas sin "homo sapiens", strebas plejeble sekurigi sian vivon, fordonante kiel eble malplej el sia forto, el sia energio. De tiu ĝenerala aspiro fontas la ekspluatemo de la homo al la naturo, al la aliaj bestoj. Pelate de tiu bezono, la homo tiel disvolvis sian inteligenton, elpensis kultivadon kaj industrian, kreis la "laboron", kiun li per ĉiuj rimedoj preferis al aliaj ol si mem. Kaj tiun laboron - simbolon de ekspluatado - niaj samtempoj, eĉ ties verdula avangardo, volas nepre konservi. "Almiliti la senlaborecon!" estis la moto, kiun aplombe blekis kompatindaj "ekologianoj" en la vintrofina balotkampanjo de Francio.

Mi sugestas al ili ion iom alian : "For la mal- kaj senutilan laboron ! Por kiel eble plej da utila, plezurona aktiveco !"

Vivu la vera progreso, kiu forigas la laboron, do la ekspluatadon, kaj ebligas produkti pli da utilaj varoj ne nur per malpli kaj malpli da homa svito sed per redonado al la naturo de tio, kion oni devas rabi de ĝi (per bio-agrokulturo,

"rekuperado" kaj reuzado de krudmaterialo, ekzemple! Ni sisteme forigu la senutilajn oficojn. Per nun mondscale efektivebla distribuado ni forigu amasegon da "laboro"! Restu nur la nepre necesa kultivado, bredado (en Francio 6 % de la loĝantaro zorgas pri tio, sed 2 baldaŭ certe sufiĉos) kaj la industrio. Imagu kiom da forigeblaj oficoj, kiam oni organizos senpagecon de la vivnecesaĵoj, de la medicino, de la transportoj! Utopio? Jes ja, sed ĉu ne la nura utopio, por kiu indas "labori"?

Sed se, spite al tiu evidentaĵo, la homo preferas plu ludi sian ekspluatatan ludon, per siaj militoj kontraŭ la naturo kaj la aliaj bestoj-homoj, stakigante tie ĉi, dum oni malsatas apude, nu, vivu la privata posedo, la heredrajto, la polico por sekurigi la posedantojn, plu vivu la landlimoj kaj la armeoj por ilin defendi, resume vivu la "laboro", kiu, ĉama rimedo, fariĝis la sankta netuŝebla celo de nia frenezigiĝinta besta specio!

Kribo

Voĉo el Togolando

EL MIA RIFUĜEJO

De antaŭ pli ol kvar jaroj neniu E-sendaĵo atingis min. Mi ankaŭ ne povis ion sendi al iu. La kialo estas tute simpla: la politika etoso en Togolando devigas min adopti vivostilon tute alian. Striko nun kun aĝo de pli ol kvar monatoj, kaj la decido de ŝtatestro EYADEMA ekstermi homojn, kiuj ne aprobas lian politiksistemon, devigis multajn, ankaŭ min, serĉi rifuĝejon ekster la ĉefurbo. Nun mi vivas en mia naskiĝvilaĝo ANYRONKOPE, situanta je proksimume 50 km oriente for de Lomé. Aliaj Togolandanoj migris, unuj al najbaraj landoj, kaj aliaj al urbetoj kaj vilaĝoj interne de la lando.

Kiam finiĝos tiu krizo? Nenion sciante pri tio, kaj havante nenian esperon pri la estonteco, mi sentas nenion emon al legado kaj skribado, ĉar stomako malplena orelon ne havas. Mi fariĝas alia personeco, mi ŝanĝiĝas, mi malsaniĝas. Antaŭ kelkaj tagoj mi klopodis iri al legaĵoj, kaj mian karan notkajeregon kaptis miaj okuloj. Mia penso karambolis kontraŭ noteron. Tion mi nun, el mia rifuĝejo, disponigas al la legantoj de **Laŭte**:

KONFESO DE PEKO AL BLUMHARDT

BLUMHARDT estas germano. Li vivis en regiono Germana nomita SCHWADEN (de la popolo) kaj "WUTTENBER" (de la instancoj). En tiu parto de Germanio ekzistis multaj vekigiĝintoj. Tiu vekigo ofte okazis ĉe katolikoj, ĉar, konfesinde siajn pekojn, la katolikoj sentas sin piaj, kaj sekve ricevas vekiglumon. Ankaŭ Blumhardt vekigis. Li estis sampensa kiel Jesuo, kaj predikis dum la mezo de la antaŭa jarcento. Oni povas nun iel aŭdeti lin:

"Mi estas la nova sendito al vi por savi vin de viaj pekoj.

Ĉu vi ne volas ĝui la postmortan vivon eternan? Ĉiuj vi pekas, kaj tiujn pekojn vi konfesu al mi, por ke la eterna vivo estu via. Malbenitaj kaj malfeliĉaj estu tiuj, kiuj ne akceptos konfesi siajn pekojn al mi, kaj sekve konvertiĝi."

Jen do multaj homoj vostostaris antaŭ la domo de Blumhardt kiu tagojn kaj noktojn plenajn aŭdis pekojn de personoj sopirantaj je eterna vivo postmorta.

Kian pekon oni do konfesas al Blumhardt?

Plejoftege, la vekigiĝinto aŭdis: "Mi faris ROMPATAN KOITON".

Ĉu tio povus signifi, ke la tiamaj loĝantoj de tiu Germana parto ŝategas la ROMPATAN KOITON?

GBEGLO Koffi

IOMETE PRI DI-SENDITOJ

Princo Gotamo, nomata ankaŭ Sidijarto aŭ Zakia-Muni, sed multe pli konata kiel Budho, kiun oni konsideras la plej granda el la Profetoj, vivis inter la jaroj 624 kaj 544 antaŭ Kristo. Li predikis dum 45 jaroj kaj multaj el liaj saĝaj kaj iluminigaj vortoj troviĝas sur ĉies lipoj, nome: "Anstataŭ malbeni la mallumon, ekbruligu kandelon".

Alia granda Profeto, kiu laŭŝajne mortis krucumita je sia 33-jaraĝo, Jesuo-Kristo, iun 5-an (aliaj opinias, ke la 7-an) de aprilo de la jaro 30-a kaj ĉirkaŭ la 3-a horo posttagmeze, esprimis: "La spirito estas la viviganto; la karno nenion utilas."

Alia konata Profeto estis Mohamedo, kiu vivis inter la jaroj 570-a kaj 632-a kaj havis dek du edzinojn kaj kelkajn gefilojn, diris ĉi tion: "Ho vi, kredantoj! Vere la vino, la

hazardludoj kaj la idoloj kaj la sagoj (ilin oni ĵetis por diveni la sorton) estas ĥontindaĵoj, verko de Satano, do evitu ilin por ke vi estu sukcesa."

Nova Profeto vivis inter la jaroj 1819-a kaj 1850-a. Li estis Mirza Ali Mujammad, kiu poste alprenis la titolon "Bab" (t.e. Pordego). Li starigis la religi-movadon, kiu nomiĝas "Bahaismo". Bab esprimis: "Tiel adoru Dion, ke Li vin rekompencos".

Mi, Anastasio Lopez-Luna, kiu en la lasta jardeko de la 20-a jarcento post Kristo ankoraŭ troviĝas inter la vivantoj, kaj kiu estas nek profeto nek profeteto nek saĝulo nek astrologo kaj simile, esprimas: "Spite tiom da laŭsajnaj Di-senditoj, kiom da miskomprenoj plu daŭras inter la homoj!"

Konklude: mi kredas, ke ĉiuj Profetoj kaj Profetetoj, kiujn prezentas al ni la Sanktaj Libroj de la homaro, estis sinceraj mensoguloj, ĉar ili kredis aŭdi la Dian voĉon. Sed la Supera Faristo ne parolas al la homoj.

A. Lopez Luna

"ESPERANTO 44", Esperanto-Asocio en la regiono de NANTES, (Francio) proponas intensan E-staĝon de Sab. 29a de majo ĝis Lu. 31a de majo 1993. Staĝejo: Centre de Vacances Les Korrigans, 122 route de l'Océan, F 44510 LE POULIGUEN. Tel. 40 42 31 10. Trinivelaj kursoj. Aliĝilon petu de: Anita CORTES, 5 bis rue Appert, F 44100 NANTES Tel. 40 69 32 43.

INTERNACIA RENKONTIĜO

Por la novjaraj festoj, francaj samideanoj S-ro Llech-Walter kaj S-ro Gérard-Voinçon, estis akceptitaj ĉe la E-grupo en La Laguna (Tenerife, Kanariaj Insuloj). Kunveno okazis ĉe la sidejo de la grupo kun partopreno de S-ro L. Trujillo, delegito de UEA en tiu urbo kaj de membroj de la loka Societo. Amika tagmanĝo kaj vizito de la urbo finis agrable tiun akceptadon.

La plej belaj pensoj:

"Amo estas la nura riĉaĵo, kiu kreskas laŭ la malavaremo. Ju pli ni donas, des pli restas al ni..."

Romain Gary ("Clair de Femme")



VORTOJ DE MALJUNULO

—
 valo
 —

EL MIA GALERIO DE PORTRETOJ

IV. Du rektaj kuzoj de avo de Ivona

* Jean Reboul (Johano Reboul)

Li estis panisto kaj poeto.

Se iu venis en lia butikon kaj petis pri sinjoro Jean Reboul, li demandis: "Ĉu la paniston vi deziras vidi, ĉu la poeton?"

Se la respondo estis: "la paniston", li diris: "Estas mi".

Se "la poeton", li petis la vizitanton sidiĝi kaj atendi momenton. Li eniris en la apartamenton por rapida tualetto kaj revenis vestita per longa nigra jakto kun arte nodita kravato.

Tia li estas reprezentita sidanta per marmora monumento en la ĝardeno ĉe la Fonto de Nimo. Sur la soklo estas bareliefe skulptita alegorio pri lia fama poemo "L'angelo kaj l'infano".

Proksime de la Fonto kaj de la Kvadrata Domo, sur ĝardenplaco stras statuo de imperiestro Antoneno. Sur la piedestalo kvar versoj de Jean REBOUL, en kiuj la imperiestro estas nomata "infano de Nimo". Fakte Antoneno naskiĝis ie en Italio; eble unu el liaj avoj iam loĝis en Nimo, kaj eĉ tio ne estas certa. Sed al poeto estas lice ĉerpi sian inspiron el legendo, kaj la legendo pri Antoneno nimano estas ankoraŭ viva.

La urbo donis la nomon de Jean REBOUL al la strato, kie situis lia domo: bakforno kun knedujo, butikon kaj hejmo. Dum sia vivo li estis sufiĉe fama, sed nun ekster Nimo malmultaj konas lian nomon kaj legas liajn verkojn. Sendube li ne estis genia poeto kiel liaj amikoj LAMARTINE kaj MIS-TRAL, sed liaj versoj estis bone konstruitaj kaj ofte belsonaj. Li verkis en la provenca lingvo kaj plejofte en la franca.

Katoliko kaj rojalisto, lia inspiro estis ofte religia aŭ markista, do rekte kontraŭa al miaj ideoj. Sed li estas unu el la gloroj de la familio, kaj almenaŭ al lia versista talento mi ŝuldis tiun ĉi omaĝon.

* Louis ROSSEL (Luizo Rosel')

Grandformata fotoportreto de tre juna oficiro kun apenaŭ ekkreskantaj lipharoj. Li estis protestanto, filo de Cevena hugenoto kaj de anglino. Kiam li eliris el la Politeknika Lernejo, li tuj eniris en la armeon. Tiam lia patro, ankaŭ politeknikano, estis artileria majoro.

En 1870 la juna leŭtenanto estis deĵoranta en la fortikigita urbo METZ ĉirkaŭata de Prusa armeo. Eksciinte ke la ĉefkomandanto marŝalo BAZ AINE preparas kapitulacion, ROSSEL kaŝe fuĝis. Li sukcesis eliri el la sieĝata urbo kaj iris al Parizo. Tie li sin metis je servo al la Komuno. Do ni povus prezenti lin kiel Komunanan heroon kaj martiron. La vero devigas min nuancigi tiun prezenton. ROSSEL ja ne estis socialisto nek revoluciano, li estis militisto kaj patrioto. Li aliĝis al la Komuno, tial ke ĝi daŭrigis la lukton kontraŭ la Prusoj kaj konsekvence ankaŭ kontraŭ la reakcia kaj kapitulacema registaro de Adolfo THIERS en Versajlo.

La Komuno nomis lin komisaro t.e. ministro de la armeo, sed li baldaŭ ekŝiĝis, ĉar li ne sukcesis trudi al la trupo la striktan disciplinon laŭ li nepre necesan. Laŭ efikeco li sendube estis prava, ĉar estas ja vere, ke la disciplino faras la ĉefan forton de la armeoj.

Tiu improvizita armeo sensperta kaj sendisciplina ne povis venki. Ĝi estis venkita ne de la Prusoj, kiuj observis kiel trankvilaj spektantoj, sed de la Versajlanoj pli multaj, pli forte armitaj, kaj pli trejnataj.

Multaj Komunanoj estis mortigitaj, kelkaj transportitaj en Nov-Kaledonion. ROSSEL, kaptita, estis juĝita en Versajlo kaj kondamnita al morto.

S-ro THIERS proponis al li vivosavon, nur se li konsentus ekziliĝi en Anglio, la lando de sia patrino. Li senhezite rifuzis, li estis mortpafita.

Lia fratino, Bela, preskaŭ ĉeestis la ekzekuton. Tuj poste ŝi povis vidi kaj tuŝi la ankoraŭ varman korpon de sia frato

kaj trempis naktukon en lia sango. Poste ŝi ĉiam tenadis ĝin en sia monsaketo kaj ĝin montradis en la familio. Ivona memoras, ke ĉirkaŭ 1910 ŝi plurfoje vidis tiun sango-makulitan tuketon.

Nun la ĉerko kun la skeleto de ROSSEL kuŝas en la protestanta tombejo en NIMO, kaj la urbo donis lian nomon al unu el siaj stratoj. Sed kiom da Nimanoj scias, kiu estis tiu Louis ROSSEL ? Almenaŭ la familio konservas pian memoron. Kiuj konas min, tiuj scias, ke mi ne estas samideano de tiu patriota militisto. Sed li estis fidela al sia idealo, kaj mi omaĝas al lia karaktero.

Etapoj

La 19-an de februaro mi finis mian naŭdek-trian jaron. Do mi estas nun en la 94-a. Estas multe. Estas tro. Mia avo la lokomotivisto estis forto de la naturo : alta statur, largaj ŝultroj, fortaj membroj, rekte staranta. Li mortis 90-jara pro pulm-inflamo versajne ne sufiĉe zorge kuracita. Kial mi devas vivi pli longe ol tiu fortika avo, mi kiu estas nun ruino kaj rubaĵo ?

Mia patro diris : "Virino havas la aĝon, kiun ŝi ŝajnas havi. Viro havas la aĝon, kiun li sentas." Gis okdek jaroj mi sentis min juna. Mi estis fiera pri mia plata ventro kun fortaj muskoloj. Tiam, okaze de operacio, oni traboris ĝin kaj ĝi fariĝis dika kaj mola. Pluraj kuracistoj diris al mi, ke kion ajn mi farus, mi ne povus reakiri abdomenajn muskolojn. Tio estis unua etapo sur la vojo al maljuneco.

Aŭgusto 1989. Akcidento : aŭtomobilo frakasis mian maldokstran kokson. Sekvis monatoj da senmoveco en hospitala lito. Cu do dua etapo ? Ne, ĉar mi releviĝis, unue en rulfotel, poste kun du anglaj lambastonoj, poste kun unu ordinara bastono, fine sen lambastono. En la dua duono de 1990 mi povis denove marŝi facile kaj rapide tra la tuta urbo Nimo, alsupri la monteton, sur kiu staras la turo Magna, kaj mi faris projektojn por la venonta somero.

Januaro 1991. La subita blindiĝo ruinigis ĉiujn belajn planojn. Mi estis trudita definitive rezigni pri amataj korpekzercoj : longe marŝi sur montoj, serĉi fosiliojn sur flankaj de-

klivoj, plongi kaj naĝi en niaj Cevenaj riveroj ; ĝardenumi, pluki florojn kaj fruktojn, grimpi tra la branĉoj de alta ĉerizarbo. Mi ne plu saltos el la lito frumatene por rigardi la belan koloron de la dolomita krono de la Kaŭso en la lumo de la leviganta suno. Mi devis rezigni ankaŭ pri intelektaj okupoj kiel senpera legado kaj skribado. Nur dank'al afabla helpo de sindonemaj samideanoj mi restas en kontakto kun la esperanta movado.

Mi marŝas ĝis du kilometrojn en koridoro aŭ sur teraso, palpe gvidante min ĉe la bordaj muretoj, sed pli ofte mi restas sidanta sur ĝardenfotelo en sunhelo aŭ en ombro laŭ la vetero, nenion farante, preskaŭ ne pensante, kiel vera maljunulo. Tio estas la dua etapo. Esperinde la lasta.

Iam en afabla letero K-do OSAKI Kasuo esprimis la deziron, ke mi vivu cent jarojn. Dankon, amiko, pro la bona intenco, sed pro kompatato ne deziru tion. En la daŭro de sep jaroj kiu nova plago povus frapi min ? Ci tie, en tiu ĉi domo por emeritoj, mi renkontas kelkajn maljunajn pensiulojn, kiuj estas mense kadukaj. Ĉu sama sorto min atendus ? Mi tremas je tiu supozo. Prefere tuj morti ol havigi al miaj familianoj tiel afliktan spektaklon. Por mi de nun, nur unu espero kaj deziro : ke mi mortu sufiĉe baldaŭ por lasi al miaj amataj geidoj memoron pri avo maljuna kaj fizike kripla, sed almenaŭ kun normale funkcianta cerbo.

Amikoj de **Laŭte!** mia hodiaŭa papero ne estas gaja. Sendube tial, ke mi tro pensis pri mi. Prave diris PASKALO : la "mi" estas malaminda. Alian fojon mi provos elekti pli agrablajn temojn.

Bona novaĵo

Kokeriko ! Flirtu blu-blank-ruĝa flago ! Franca industrio ricevis grandan mendon de batalĉaroj por la Unuigitaj Arabaj Emirregnoj.

Bonega afero : multaj horoj da laboro por francaj laboristoj kaj suka profito por kelkaj firmaoj-mastroj.

Oni ja scias, ke la armilnegoco estas unu el la plej profitdonaj. Por aĉeti tiajn varojn oni ĉiam trovas monon kaj ĉiam troviĝas vendistoj. Povas manki nutraĵoj kaj kuracaĵoj, sed

ne mankas kanonoj kaj municioj. Estu trankvilaj : tion prizorgadas kompetentaj komercistoj en la plej civilizitaj landoj.

Francio estas unu el tiuj. Freŝdate la firmao DASSAULT ricevis gravan mendon de militaviadiloj por Tajvano. Kaj oni scias, ke en la brita-argentina militeto pro la Malvinaj Insuloj estas franca "Exocet", kiu pure kaj elegante alfundigis belan britan militŝipon.

Jes, Francio estas tre civilizita nacio, kaj ni Francoj estas tre kapablaj por koncepti, fabriki, vendi kaj liveri amasmortigilojn kun la maniero por ilin uzi.

Brave Francoj ! Vivu Francio !

Amikino Lina Gabrielli informas nin pri la forpaso, la 15an de januaro '93, de la esperantista verkistino kaj pentristino Antonina APOLLO el Tallin, Estonio. Ŝi sendis du poemojn de ŝi, por memori pri ŝi :

LA FOLIO

Nubo sur l' ĉielo
pendas mole vata,
glitas sola velo
laŭ la maro glata,
kaj ĝi respegulas
ombre sur l' surfaco,
vento ondojn rulas,
ĉie regas paco
ĝis la fora limo

Nur en koro mia,
nur en la animo
mankas paco Dia.

28.IX.1992

**Antonina
APOLLO**


Hodiaŭ jam matene frue
vento taŭzis arbojn brue,
ĝi disŝiris foliaron
kaj forpelis en la maron.
Preter mi folioj flugis,
ien malproksimen fuĝis.
Vento en vizaĝon blovis ;
min folio unu trovis,
ĝin al lipoj premis vento,
tenis tie dum momento,
dum momento efemera,
nereala, tamen vera.
Min ĝojigis tiu sento,
sed folion prenis vento,
portis al la spaco mara -
dronis folieto kara.

Spuro sur la lipoj restis,
ĉar la kiso fakte estis.

18.VII.1992

Mendu diskedon de "Serĉu : Angela L."

per 9 DM / 30 FF / 10 NLG en poŝtmarkoj aŭ monbileto
de Marcus SIKOSEK, Kampstr. 75a, W-4390 GLADBECK.



amareco

Mi ĉiam ĝojis pro la ĝojo de aliuloj, eĉ se tio ne donas avantaĝojn al mi. Alies ĝojo estas la mia, sen iu ajn intereso. Sed nun via ĝojo suferigas, plorigas min ! Ĉar mi valus, ke vi ankoraŭ, almenaŭ por unu fojo, ridu kun mi kaj mi kun vi.

Ke vi nun, male, sentas vin plene feliĉa kun alia knabino, tio estas doloro por mi, doloro kun nostalgio kaj sopiro, ne kun malboneco kaj ĵaluzo.

Vi certe estus amanta vin, je aliaj cirkonstancoj ; ĉar via animo ektuŝis la mian, ankaŭ via korpo. Eble ankaŭ vi flaris en mi inan ĉarmon, ian nostalgion, eble vin tuŝis la bedaŭro, ke inter ni nenio estas realigebla.

Ĉu vi povas forgesi niajn promenadojn en la kongresa urbo, laŭlonge de la rivero, kun mano en mano ? Ĉu vi povas forgesi nian sidadon sur la benko fronte al la rivero, kiam vi aŭskultis ĉarmita miajn rakontojn. Mi sciis bele paroli, nur ĉar vi atente aŭskultis min. Vi preskaŭ dronis en la atmosfero de miaj rakontoj.

Sciu, ke antaŭ la foriro de mia hejmo por atingi la kongreson, mi planis viziti ortopedian kuraciston. Miaj kruroj, miaj brakoj, en la lito pene moviĝis... Poste, kiam mi renkontis vin, mi ne plu bezonis ortopediiston. Ekkreskis flugiloj. Mi tiam komprenis, ke la tristeco, la doloro, la soleco paralizis min... Tro malmulte da oksigeno vivigis min. Vi estis la oksigeno, kiu transformis min.

Kun vi mi kuris. Ĉu vi memoras, ke post la fino de la ekskursoj kun la aliaj, ni malsupreniris la aŭtobuson kaj piediris ĝis nia loĝejo ? Tri, kvar kilometrojn kaj tio ne lacigis min. Mi bedaŭris nur, ke de tempo al tempo vi haltis por diri al mi, ke vi ne povas geedziĝi kun mi.

Ĉu vi povas supozi, ke mi havis tian iluzion ? Niaj cirkonstancoj ne permesis geedziĝon. Eble vi pensis, ke estus bele se tio povintus.

Mi, miaflanke, havis emon por vi, kaj se vi edziĝus kun mi, mi lasus al vi la tutan liberecon por rekompensi vin. Mi tolerus ankaŭ jarojn de via malesto por kelkaj momentoj de feliĉo ; kaj je via reveno mi lumigus la tutan hejmon, la tutan ĝardenon kun koloraj globetoj por festi vin.

Jes, estis ĉarmo inter ni, ne ripetenda !

Ĉu vi memoras, kiam vi acetis glaciaĵon je napola benk-vendejo ? La glaciaĵo estis treega kaj gutis. Mi, kiu havis belan veston, timis makuli ĝin. Pro tio mi kurbiĝis kaj la gutoj falis teren. Tiam la glaciaĵvendisto laŭte ridegis. Vi apenaŭ ridetis. Ankaŭ mi laŭte ridegis por kaŝi la embarason kaj por ne doni ŝnuron al la mokaĵo.

Ĉu estas en via rememoro la lasta paĝo de nia kunesto ? Ni ekskursis iom trajne, iom skitelfere, iom ŝipe... Via brako ĉirkaŭis mian talion, kaj al mi tio ŝajnis la eterneco. Mi ne konsciis pri nia baldaŭa disiĝo.

* * *

Poste la malproksimeco sen promesoj. Estis demandsigno nia revidiĝo. Tamen mi dediĉis al vi miajn pensojn. La necerteco, kiu cetere estis espero revidi vin, helpis al mi vivi sen vi.


Ho, kiom mi volus kvietigi mian sopiron esti kun vi ankoraŭ kelkajn momentojn ! Nova kongreso alkproksimiĝas... Kial ne ?

Sed... Nun esperoj ne plu ekzistas. Mi eĉ ne plu deziras revidi vin. Vi definitive ligiĝis al la alia knabino, pri kiu vi ofte parolis al mi. Ne plu allogo pri neeblaĵoj, pri miraklaj renkontiĝoj, ne plu nostalgio pri pasintaj feliĉoj, kiuj ne plu ripetiĝos. Vi definitive ligiĝis al alia knabino por geedziĝo.

Antaŭ via ligiĝo mi ploris. La antaŭan vesperon, mi atendis tramon en strato Labikaná en Roma. Aŭtomobilo haltis antaŭ mi. Sinjoro kaj sinjorino demandis min : "Ĉu vi fartas malbone ? Ĉu ni povas helpi al vi ? " Poste paro de afrikanoj, kiuj atendis kiel mi la tramon, faris la samajn demandojn. Mi sekigis miajn okulojn, mirigita ke en la mondo de indiferenteco kaj de fruigo, iuj estis rimarkintaj mian doloron. Kaj dume mi ripetadis mallaŭte : "Kial vi faras tion, mia kara, ĝuste nun, kiam estas okazo por revidi nin ?"

Tamen al vi, kiu sciigis min pri la okazintaĵo, mi skribis :

"Via anonco ne mirigas min. Ke vi volas geedziĝi, tio estas normala afero. Pli-malpli frue tio devus okazi. Kaj vi partoprenigis min pri via feliĉo ! "



SUBTAKSATA FLARosenso

Potenca magiisto, ĝi ebligas, ke ni retroiru mili-onojn da kilometroj kaj abrupte revenu al jam traviv-itaj jaroj. Nenio estas pli memoriga, ol odoroj, vera obsedo por ĉiuj popoloj. Ni kapablas ekpercepti pli ol mil malsamajn odorojn. Esploroj elmontris, ke same infanoj, kiel plenkreskuloj, scipovas diri, ĉu vestaĵo estis surportata de viro aŭ virino. Tamen se ege preciza montriĝas nia flarosenso, preskaŭ neblas, ke ni priskribu difinitan odoron al tiu, kiu ne spertis ĝin.

Nia flarosenso konstante laboras : ĉiufoje, kiam ni en- aŭ elspiras, ni transirigas la mondon tra nia korpo ; poste ni ĝin liberigas, sed iel modifita. Dubla estas spirado. Ĉiutage ni spiradas proksimume 23 040 fojojn. Dum du sekundoj ni enspiras ; dum tri ni elspiras. Dume svarmas odormolekuloj. Bedaŭrinde, nefortaj estas la ligoj inter la flarosenso kaj la cerbaj parolcentroj. Kvankam la odoroj estas al ni pli proksimaj kaj altvaloraj, ol io ajn, ni ilin elvokas pere de vortoj rilatiĝantaj al alispecaj sensaĵoj. La odorefikojn ni pli facile priskribas, ol la odorojn mem. Eble magian potencon, misteran econ ili akiras : tial, ke ilin ekzakte koni ni ne kapablas.

La violoj de ĉiam montriĝis malcedemaj al la parfumarto. Eltiri el ili altkvalitan parfumon postulas multe da penado kaj mono. Ili entenas substancon, kiu kvazaŭ fuŝkontaktas la flarsenson. La floro daŭre eligas sian parfumon, sed ni ne plu perceptas ĝin kaj necesas, ke pasu unu-du minutoj, por ke ni ĝin ekperceptu denove.

Senpere funkcias la flarosenso. La parfummolekuloj eniras la nazkavaĵojn post la nazoeĝo ; tie ili estas ensorbataj de la mukozaj riceviloj, kies etaj ĉeletoj nomiĝas cilioj. Poste milionoj da ili sendas signalojn al la flarosenza bulbo en la cerbo. Unik-aĵon tiuj ĉeloj konsistigas : neniu detruita neŭrono reviviĝas krom la nazneŭrono, kiu spontane reviviĝas post trideko da tagoj.

Ĉe la supra fino de ambaŭ naztruoj la flarregionoj

estas flavaj, abunde malsekaj kaj plenaj je grasa substanco. Heredeco difinas la flavonuancon. Ju pli malhelflava, des pli subtila kaj preciza la flarosenso. Ĉe albinoj ĝi ne tre riĉas.

Kiam la flarsensa bulbo ion perceptas en la momento, kiam ni manĝas, amoras, travivas emocion, ĝi sendas signalon al la cerba ŝelo kaj direktas rektan mesaĝon al la limbo, praa mistera kaj ege emocikapbla sekcio de nia cerbo (tie ni spertas la seksajn impulsojn, tie ekfermentas niaj eltrovaĵoj).

Ĉiuj odoroj povas esti klasifikataj laŭ kelkaj fundamentaj kategorioj : floroj, eteraj (piroj), je mento, muskaj, rezinaj (kamforo), fetoraj, acidaj. Tial en laboratorio oni kapablas krei parfumojn je la molekula nivelo. Inter la unuaj plene sintezaj oni menci la faman "n-ro 5" de Chanel lanĉitan en 1922, daŭran ino-klasikaĵon.

De jarcentoj oni mortigas bestojn por kolekti kvar ĉefajn glandajn sekreciojn. Temas pri :

- ambro : olea fluidaĵo sekreciita de kaĉaloto ;
- kastoreo (el abdomenaj saketoj de kanada kaj rusa kastoro ; per tio ĝi signas siajn grundolimojn) ;
- cibeto : miela sekrecio el la genera korpozono de la ĉi-koncerna besto ;
- musko : ruĝa sekrecio, kiu pensigas pri jeleo kaj venas el la intesto de cervo vivanta en orienta Azio.

La besta musko estas tre proksima al testosterono ; tial ni kapablas ĝin percepti etproporcie. La ĥemistoj prilaboris 20 specojn da musko.

Ok molekuloj sufiĉas por eksciti la nervofinojn, sed necesas ke 40 nervofinoj estu stimolataj, por ke ni ion perceptu. Odoras nur la substancoj sufiĉe volatilaj por vaporigi en la aeron etajn partikulojn.

Kutime la homestaĵoj eligas fortan korpodoron, kiu malsamas de unu raso al alia. Azianoj ofte opinias, ke fortas la korpodoro de Eŭropanoj. Tiel maloftas forta korpodoro ĉe Japanoj, ke iam soldatiĝontoj es-

tis eksigitaj pro nekutima akreco de la korpodoro. Cetere Azianoj parfumas siajn hejmojn prefere al si mem.

Grasaĵojn entenas la haroj : pro tio la kapkusenoj makuliĝas. La hararo ensorbis la odorojn (fumon, kolonjan akvon). La harsistemo de blankuloj kaj nigrujoj igas ilin multe pli ŝvitemaj, ol flavhaŭtuloj.

La odorportaj glandoj konsiderinde disvolviĝas en tempo de seksomaturiĝo. Ili estas multenombraj kaj disigitaj en la aksela, vizaĝa, brusta, genera kaj anusa regionoj. El tio kelkaj scienculoj konkludis, ke plaĉas al ni interkisiĝi, ĉar plaĉas al ni flari unu la alian, karesi al ni la vizaĝojn reciproke, kie disradiadas la personaodoro. En kelkaj landoj la vorto "kisi" signifas "flari". En novgvinea tribo la tribanoj adiaŭas metante la manon sub la akselon de la salutato kaj ĝin demetinte karesas sian korpon per ĝi por kvazaŭ vesti sin per laodoro de l' amiko. En aliaj kulturoj oni frotas al si la nazojn reciproke por saluti.

Infanoj ne odoras, kiel plenkreskuloj ; fumantoj, kiel nefumantoj ; vegetaranoj, kiel nevegetaranoj. Gravas ankaŭ heredeco, sanstato, okupoj, ensorbo de medikamentoj, emocioj kaj humoro.

Dum la elizabetana epoko la geamantoj interŝanĝis amopomojn. La virino lokis senŝeligitan pomon sub la akselon kaj ĝin konservis tie ĝis ĝi estis de ŝvito trasorbata ; tiam ŝi donis ĝin al sia amato, por ke li ĝin spiradu. Hodiaŭ tute inverse industriistoj klopodas foriginiajn naturajn odorojn kaj ilin anstataŭigi per artefaritaj.

Kleopatra akceptis Antonion en ĉambro, kies grundo estis surŝutita de rozpetaloj - kvazaŭa 50 centimetrojn dika tapiŝo. La Romianoj estis obsedataj de rozoj : rozakvo ŝprucis el la imperiestraj fontanoj kaj fluadis en la publikaj bandomoj. La kusenojn oni remburis per rozpetaloj. Kuraciloj kaj amorigaĵoj entenis rozesencon. Festotagon oni difinis honore al la rozo (ĝi nomiĝis "rosalia"). Okaze de bankedo Ne-

rono elspezis sumon, kiu egalvalorus 160 000 dolarojn en roz-akiro kaj unu el la gastoj pereis sufokita de rozpetala surŝuto.

La islamaj kulturoj vidis mistikan simbolon en tiu floro. XIII-a-jarcenta mistikulo diris, ke rozo ĝemspiras "Alaho!" ĉiufoje kiam oni ĝin flaras. En la komenco rozarioj konsistis el 165 rozpetaloj zorge envolvitaj post sekigado kaj la rozo estis la simbolo de la Virgulino. La krucmilitistoj enkondukis en Eŭropon rozesencon kaj santalon. Dum longe aromoleoj estis laŭmodaj, ĉar ili sugestis allogajn malpermesitajn plezurojn.

En antikveco, cedrolignon la arkitektoj uzis en palacokonstruado, ne nur pro ties dolĉa parfumo, sed ankaŭ ĉar ĝi forigas la insektojn. La konstruintoj de moskeoj miksis rozakvon en siaj pistuloj, por ke sub la varmo de la tagmeza suno agrabla aromo eliĝu el la sanktaj lokoj. La faraonaj ŝipoj kaj ĉerkoj estis el cedro. En 400 a.K. la helenaj verkistoj rekomendis uzadi menton sub la akseloj, timianon por la genuoj, cinamon aŭ rozon por la brusto kaj makzeloj, migdaloleon por la piedoj kaj manoj, majoranon por la brovoj kaj haroj. Aleksandro la Grandulo trempigis siajn tunikojn en safran-esencon. La Romianoj parumis eĉ siajn ĉevalojn kaj dombestojn.

Tamen kun kristanismo venis erao de pudoro, timo kaj rigoro. La homoj ĉesigis la parfumkutimojn. Religia simbolismo ligiĝis kun kelkaj floroj kaj ties aromo: oni ekzemple ŝatis dianton, ĉar ĝia aromo memorigas pri tiu de kariofilo, kiu siavice, pro simileco de formo, memorigas pri la najloj de krucumado.

La antikvuloj sin lavis kaj parumis. Dum la jarcentoj de mallumo oni nek lavis, nek parumis sin. De la mezepoko ĝis la fino de la XVII-a jarcento malpuraj estis la homoj, tamen parfumataj. Dum la XIX-a jarcento oni sin lavis, neuzante parfumojn.

Dum la manĝoj ĉe la kortego de Ludoviko la XIV-a oni enlasis kolombojn antaŭe plonĝitajn en divers-

specajn parfumojn, por ke ili flugetadu inter la kummanĝantoj kaj konsistigu iuspecan odortapeton. Napoleono la unua mendis en 1810 128 botelojn de sia plej ŝatata kolonja akvo kaj dum li bataladis, florakvojn li tamen elektis por si mem.

En la iamaj japanaj kortegoj la horloĝoj bruligis malsaman incenson ĉiun kvaronhoron. Parfumo do hantis ĉiujn kulturojn kaj religiojn. Sed tio kulminas en la Nobla Korano, kiu promesas al la justuloj, dum la postmorta vivo, kunulinojn ne nur parfumitajn, sed faritajn el santala ligno - nura aromo, nura plezuro.

Nun la flarosenso fariĝis la malplej necesa el ni-aj sensoj, ia "defalinta anĝelo", laŭ la esprimo de fama surdmuta blindulino. Ĉe senigito de la flarosenso tamen funkcias plu la gustopapiloj, sed por tiu malfeliĉulo sensuka iĝas la vivo kaj povas esti, ke deprimiĝo okazus. Ne nur la vivo malriĉiĝas, sed ankaŭ oni povas esti en danĝero, kiam oni jam ne plu povas percepti gasan ellason aŭ komenciĝantan fajregon. Krome oni povas esti venenata de nutraĵo, kies putraodoro ne estis ennazigita. Jam ne plu memorigaj la parfumo! Jam ne plu korbatigaj ideosocioj!

Iom pri la parfumprofesiuloj. Severe kontrolataj estas la sekretoj. Eĉ la respondeculoj pri la fina produkto ne scias pri la miksitaj ingrediencoj, kiuj ricevas koditajn numerojn. Kiam oni kreas difinitan parfumon, la kreanto estas gvidata de ideo kaj lia arto tre similas tiun de la muzikkomponisto. Ambaŭkaze temas pri akordoj. Al harmoniĝo oni celas, ĉar neniu elemento devas superi la ceterajn kaj ilin nenigi. Se iu parfumo konsistas el kvin "notoj", ĉi-lastaj devas esti en perfekta ekvilibro, por ke ricevita impresu estu agrabla. Por akordigi la abstraktajn flor-akordojn oni devas "sekvi sian nazon" kaj forigi la mankojn.

Iam fama parfumisto bezonis 3-4 jarojn por krei novan specimenon. Li spertis du-tri fojojn tage, vivis kune kun la parfumo. Nun estas afero pri mono kaj konkurenco: oni devas rapidi.

Sed ĉiu parfumisto havas siajn proprajn akordojn, kiujn li estas enkapiginta por ilin estonte uzi en okazo de bezono. Tamen neblas, ke oni plagiatu sin mem, kvazaŭ al difinitaj akordoj oni emas reveni, kvazaŭ al ŝatataj temoj. El 500 ĝis 700 jaraj specimenoj povas esti rimarkinde altnivelaj du aŭ tri - kio ne signifas, ke senvaloraj estas la ceteraj.

Se la prahistoriaj popoloj verŝajne sin parfumis, la parfumararto vere disfloradis kaj kulminis en Egiptujo. Incenson kaj parfumojn ĝuis unue la diaĵoj kaj ties servistoj, poste la landoregantoj kaj iom post iom diversaj ŝtupoj de la socia skalo. Aromaĵoj kaj lav-akvo konsistigis ankaŭ kurachelpilojn. La Egiptoj eltrovis la manieron premi la aromajn substancojn en alcelaj grasaĵoj kaj ilin konservis en mirindaj ujoj el vitro. La ŝminko-arto ilin fascinis. Higieno ilin obsedis (kvietiga aŭ revigliga bano sekvata de masaĝo helpe de aromoleoj, kiuj malstreĉis la muskolojn kaj nervojn).

Ĉu nun ne estas priesplorita la parfumorolo en malstreĉiĝo kaj revigliĝo? Ĉu enĉambre vaporigita parfumo ne kapablas akceli la laborkvanton?...

S. BONIOL

Ĉe la Broŝurservo :

Ĵus elĉerpiĝis (forstreku el la listo!) : **Tiel diru!** (Lentaigne)

★ De nun disponebla : **Kio estas socikredito ?** SK. 3 FF

Projektitaj estas jenaj reeldonoj : **Naciecaj problemoj** (du tekstoj de Roza Luksemburg). Eble ĝi estos enŝovita en venonta Laŭte.

Abrégé pratique de Grammaire Esperanto (Lentaigne). Por tiu ĉi antaŭmendoj helpas fiksi la eldonkvanton. Vendprezo : 15 FF.

Kiu konsentos pruntedoni sian ekzempleron de "**La rajto de pigro**" (Paul Lafargue), ĉar mi ne plu disponas ĝin por eventuala reeldono? Sendu ĝin al : Esperanto, F 47470 BEAUVILLE. Antaŭdanke via Kristiano.

Nia fabelo :

La fabelo pri la Ŝlaraflando

Aŭskultu, mi volas paroli pri bona lando, kien ne malmultaj elmigras, se ili sciis, kie ĝi troviĝas, kaj se ili bonŝancus pri ŝipo. Sed la vojo al tie por tiaj junuloj kaj olduloj, kiuj vintre tro varmas kaj somere tro fridas, estas longa. Tiu bela regiono havas la nomon Ŝlaraflando, itale : Cuccagna. Jen la domoj estas kovritaj per omletoj, kaj la pordoj kaj vandoj konsistas el spickukoj, kaj la traboj el rostita porkaĵo. Kion oni aĉetas ĉe ni per dukato, tio kostas tie nur pfenigon. Ĉirkaŭ ĉiu domo staras latbarilo plektita el rostitaj kolbasoj kaj el bavaraĵoj kolbasetoj. Tiujn oni parte rostis sur krado, kaj parte freŝe stufis, ĝuste laŭ tio, ĉu iu tiel aŭ tiel manĝas ilin. Ĉiuj putoj plenas de malvazio kaj de aliaj dolĉaj vinoj, ankaŭ de ĉampano; tiuj torentas abunde en la buŝon, se iu metas ĝin al la tuboj. Kiu do volonte trinkas tiajn vinojn, tiu rapidu, por ke li envenu la Ŝlaraflandon. Sur la betuloj kaj salikoj jen kreskas la bulkoj freŝbakitaj, kaj sub la arboj fluas laktaj riveretoj; en tiujn la bulkoj falas kaj moligas sin mem por tiuj, kiuj volonte malsekigas ilin; jen tento por inoj kaj infanoj, por servistoj kaj servistinoj! Hola Gretel, hola Steffel! Ĉu vi ne volas elmigri? Venu do al la bulkorivereto, kaj ne forgesu kunpreni grandan laktokuleron!

La fiŝoj naĝas en la Ŝlaraflando supre sur la akvo, ankaŭ ili jam estas bakitaj kaj stufitaj kaj naĝas tute proksime ĉe la bordo. Sed se iu vere tro pigras kaj estas aŭtentika Ŝlaraflulo, tiam li nur devas voki : bst ! bst ! - jen la fiŝoj jam elpromenas sur la bordon kaj saltas al la bona Ŝlaraflulo tuj en la manojn, por ke li ne devu kliniĝi.

Tion vi povas kredi, ke la birdoj tie flugas rostitaj en la aero : anseroj kaj meleagro, kolomboj kaj kaponoj, alaŭdoj kaj juniperaj turdoj. Kaj al kiu faras tro multe da peno etendi manon al ili, al tiu ili tuj flugas rekte en la buŝon. La surlancigitaj porkidoj tie ĉiujare tute bonege gustas; ili ĉirkaŭkuradas rostitaj. Kaj ĉiu el ili portas endorse tranĉilon, por ke tiuj, kiuj emas, povu fortranĉi freŝan, sukan pecon.

La fromaĝoj kreskas en la Ŝlaraflando kiel la ŝtonoj, ili

igas grandaj aŭ malgrandaj. La ŝtonoj mem estas ĉiuj farĉitaj kolombokropoj aŭ etaj viandopasteĉoj. Vintre, se pluvas, jen pluvas puran mielon en dolĉaj gutoj. Jen oni povas frandi kaj leki, kaj estas ĝojego vidi ĝin ; kaj se neĝas, jen neĝas blankan sukeron, kaj se hajlas, jen hajlas sukerkuketojn miksitajn kun figoj, rosinoj kaj migdaloj.

En la Ŝlaraflando la ĉevaloj ne eligas ĉevalbulojn, sed grandajn ovojn, plenajn korbojn, kaj en tiaj amasoj, ke oni pagas por milo da ili nur pŝenigon. Kaj la monon oni povas skui de la arboj kiel kestojn. Ĉiu rajtas deski la plej bonan kaj lasi la malpli valoran. En tiu lando ekzistas ankaŭ grandaj arbaroj. Jen kreskas en la arbustoj kaj sur arboj la plej belaj vestaĵoj : jakoj, manteloj, surtutoj, pantalonoj kaj kamizoloj de ĉiuj koloroj : nigraj, verdaj, flavaj por la postiljonoj, bluj aŭ ruĝaj, kaj kiu bezonas novan veston, tiu iras en la arbaron kaj malsuprenĵetas ĝin per ŝtono aŭ paŝas per arbalesto supren. En la erikejo kreskas belaj virinvestaĵoj el veluro, atlaso, napola tuko, bareĝo, madraso, taŝto, nankeno ktp. La herbo konsistas el ĉiukoloraj bendoj, ankaŭ el ombrumitaj. La juniperaj potplantoj portas broĉojn kaj orajn brusttolaĵojn aŭ mantilajn surmetpinglojn, kaj iliaj beroj ne estas nigraj, sed aŭtentikaj perloj. De la abioj pendas virinhorloĝoj kaj larĝaj ornamitaj horloĝĉenoj kun brelokoj, kiuj tre atriĉas. Sur la arbustoj kreskas botoj kaj ŝuoj, ankaŭ ĉapeloj por sinjoroj aŭ sinjorinoj, rizpajlĉapeloj kaj marabutoj kaj diversspecaj kapkovraĵoj ornamitaj kun paradizbirdoj, kolibroj, brilantskaraboj, perloj, emajlaĵoj kaj orpasamentoj.

Ĉi nobla lando havas ankaŭ du grandajn foirojn kaj foirplacojn kun belaj liberoj. Kiu havas oldan edzinon kaj ne plu ŝatas ŝin, ĉar ŝi ne plu sufiĉe junas kaj belas, tiu povas tie interŝanĝi ŝin kontraŭ juna kaj bela kaj ricevas eĉ krommonon. La oldaj kaj fiaj - proverbo ja diras : "Se oni oldigas, tiam oni ŝiiĝas" - envenas junigan banejon, por ke la lando estu benata. La banejo havas egan forton ; en ĝi la oldaj inoj banas sin ĉirkaŭ tri aŭ maksimume kvar tagojn, kaj tiam ili ŝariĝas belaj junaj damoj, deksep- aŭ dekokjaraj.

Estas ankaŭ tre multaj kaj tre diversspecaj amuzoj en la Ŝlaraflando. Kiu en nia lando tute ne bonŝancas, tiu tie bonŝancas en la kartludado, en la aerpafado kiel ankaŭ en la faligado de kunuloj. Kelkaj paŝas ĉe ni dum la tuta vivo multdistance preter la celon, sed tie ili trafas, eĉ se ili ĉe ni

pleje preterpaŝas, la plej bonan. Ankaŭ por la dormsakuloj kaj dormfeluloj, kiuj ĉe ni povriĝas pro sia pigreco, tiel ke ili bankrotas kaj poste devas almozpeti, tiu lando bonegas. Ĉiu horo da dormo tie enspezigas guldenon kaj ĉiu oscedo duoblan taleron. Kiu perdas en ludo, al tiu la mono resaltas en la poŝon. La drinkuloj ricevas la plej bonan vivon por nenio, kaj por ĉiu gluto kaj ensuĉo ili ricevas tri bacojn da salajro, kaj la virinoj kaj la viroj. Kiu plej bone povas ĉagreni kaj mistifiki la homojn, tiu ricevas ĉiuŝoje guldenon. Neniu rajtas ŝari ion por nenio, kaj kiu elpensas la plej bonan mensogon, tiu ricevas por tio almenaŭ kronon.

En nia lando ne malmultaj impertinente mensogas kaj mensogas, kaj ricevas nenion por sia peno ; sed tie oni opinias la mensogadon la plej bona arto, kaj tial en tiun landon enmensogas sin diversspecaj prokuratoroj, doktoroj kaj aliaj -toroj, ĉevaltrompisto kaj la ...aj metiistoj, kiuj ĉiam ĉion promesas al siaj klientoj kaj ne plenumas siajn promesojn.

Kiu tie aspiras esti erudito, devas lerni kiel kruda studento kondutas. Tiaj studentoj ankaŭ ĉe ni ekzistas, sed ne kaptas dankon kaj honoron. Tia homo devas esti ankaŭ pigra kaj manĝavida ; jen tri belaj artoj. Mi konas tian, kiu tie en ĉiu tago iĝus profesoro.

Kiu volonte laboras kaj ŝaras bonon kaj lasas malbonon, tiun oni tie ne ŝatas kaj ekzilas el Ŝlaraflando. Sed tiu, kiu mallertas kaj kapablas nenion kaj tamen plenas de stulta aroganteco, estas tie rigardata noblulo. Kiu povas ŝari nenion krom dormi, manĝi, trinki, danci kaj ludi, tiun oni nomumas tie grafo. Sed al tiu, kiun la ĝenerala baloto elektis la plej pigra kaj pleje maltaŭga por ĉia bona ago, tiu ŝariĝas reĝo super la tuta lando kaj havas grandajn enspezojn.

Nun vi scias kiel statas en Ŝlaraflando. Kiu do emas sin prepari kaj vojaĝi tien, sed ne scias la vojon, tiu demandu blindulon, sed ankaŭ mutulo konvenas por tio, ĉar tiu la falsan-vojon certe ne diras. Nu, sed ĉirkaŭ la tutan landon etendiĝas monte alta muro el rizkaĉo. Kiu volas eniri aŭ eliri tie, tiu devas unue ĝisbruste pene tramanĝi sin.

tradukis **Hagen Hirte**
el germana fabelkolekto eldonita de Bechstein
(inter 1845 kaj 1856)

L' ARANEO

De du lonoaj semajnoj li vivaĉis en ĉelo ; li ne plu sukcesis pensi, kvazaŭ lia cerbo estis lavita, broŝita en la plej etaj faldoj. La horoj fluadis ege malrapide, la tagoj estis monotonaj, sen malglataĵoj por altiri la atenton. Kiam tiu senespera viveto finiĝos ?

Nu, iun matenon, post la kutima inspekto de sia ĉelo, la malliberulo malkovris... araneon, tute nigran, kun longaj kruroj. Kia belega surprizo ! Li ne plu estis sola ! Tial li amike, entuziasme akceptis tiun neatenditan vizitanton. Lia konduto estis certe miriga, ĉar hejme li timis tiun besteton. Lia abomeno ĵus malaperis, kiam li rigardis l' araneon kun simpatio.

Ĉiutage li observis ĝin, li ŝatis ĝian akrobatfacilmovecon. Li estis fascinata de ĝia retaĵo, farita el silkfadenoj interplektitaj : vera mirindaĵo ! Li memoris pri plezuro kontempli, post oluvo, araneaĵojn tute brilantajn pro roso ; sendube ili surmetis diamantkolierojn por celebri la edziĝofeston de feino !

Iom post iom la cerbo de la malliberulo rekomencis funkcii. En sia koro la floro de l'espero, kiu velkiĝis, perdis sian vivan sukcon, denove floriĝis. La pano pli bone gustis. Araneo ĵus savis lin de frenezeco, kiel en la islama tradicio, kie araneo protektis la vivon de profeto, teksante sian retaĵon tra la aperturo de la kaverno, kie la di-sendito rifuĝis por eskapi el siaj malamikoj ; ĉi tiuj, vidante araneaĵon, pensis, ke la groto estis delonge sen loĝanto kaj aliloken serĉis.

Inter la araneo kaj la malliberulo la ligiloj rapide fortiĝis, homiĝis. Matene li malfermis la okulojn, pensante pri sia nova amikino, al kiu li rakontis sian vivon. Li estis feliĉa trovi la paroluzon. La vortoj ŝprucis kaj transformiĝis en ĉielarkon, kies koloroj penetris en lin kiel vivakvo. La araneaĵo fariĝis suno kaj la malliberulo reviviĝis sub la blua klaro de la tenereco, teksis la veston de siaj tagoj per la fadenoj de l'optimismo. Denove lia koro estis barko, en kiu li rekomencis vojaĝi.

Sed iun matenon li serĉis vane sian "karulinon". Li timo komencis nesti en lia korpo, kiam li aŭdis malfortan voĉon :

- "Mi estas ĉi tie ; trankviliĝu, nenio grava okazis al mi ; mi deziris iomete promeni, tutsimple. Mi profitas de la okazo por prezenti min : mi estas komuna araneo de viaj loĝejoj ; certe mi ne estas beleta, mi ne havas sorĉan gracion, sed vi

sendube rimarkis miajn carmajn kuzinetojn kun brilaj koloroj. Ni vivas ĉie, eĉ sur monto Everest, en la arktika regiono, la dezertoj, la grotoj, la akvo. Ni ekzistis jam dum la karbonia periodo. Nekredeble, ĉu ? Ni havas eksterordinaran povon : ni sekrecias silkaĵojn kun malsimilaj kvalitoj laŭ la dezirata uzo..."

La araneo senĉese donis detalajn klarigojn kaj la malliberulo interese aŭskultis ; entuziasme li diris :

- "Viaj verkaĵoj estas mirindaj !"


- "Sed multaj homoj rigardas nin kun neakcepteblaj antaŭjuĝoj. Ili diras, ke ni estas danĝeraj ; nu, inter la kvindek mil specoj konataj en la mondo, nur unu deko povas kaŭzi la morton. Krome, en via lando, nur la piko de la "nigra vidvino" el la mediteranea regiono kaj Korsikio estas mortiga. Sed tiu speco troviĝas en malmulte vizitataj lokoj kaj ĝi estas "timida"..."

Vi trovas nin kruelaj, ĉar ni gluŝmiras niajn kaptitaĵojn por ilin manĝi vivantaj. Kaj la gluo, kiun vi uzas por kapti la birdojn, ĉu tio estas pruvo de afableco ? Vi mortigas tiujn bestetojn ne por vin nutri, sed por via plezuro, por kantigi viajn papilojn.

Manĝante la insektojn, ni ludas rolon en la natura ekvilibro. Ĉu vi scias, ke niaj retaĵoj estis uzataj kiel bandaĝoj sur vundoj ? Oni testas sur ni la efikon de drogoj sur la cerbo kaj la muskoloj : drogite, ni fuŝe teksas. Mi ne volas tedi vin per tiuj detaloj ; tial por fini mi deziras diri nur, ke de pluraj tagoj, dank'al vi, mi travivas nekutimajn momentojn : mi havas en miaj ok kruroj specon de varmo, kiu plaĉas al mi, kaj en mia kapo floras aliaj agrablaĵoj. Via amikeco ĝermigis en mi la semon de l' feliĉo. Kia mirinda stato ! Sed mi ne scias kiamaniere danki vin..."

Nu, iun tagon, la malliberulo malkovris la donacon de l'araneo : tio estis ŝlosilo, speciala ŝlosilo, permesanta teksti en li la stelon, kiu lumigos kaj gvidos lin sur la longa vojo, kiu unue kondukos lin al la plenumado de si mem kaj poste al la mano de la aliulo.

Michèle Freud.



Mi decidis verki tiun ĉi artikolon por montri al legantoj de **Laŭte** riĉecon de pejzaĝoj kaj antikvecon de belega Litovio.

Litovion mi vizitis por renkontiĝi kun mia Vilnusa korespondamiko Dainius Pranauskas. Jam la unuaj veturminutoj en Litovio montris al mi verdecon de ĉi tiu lando. Unue mirigis min grandegaj malplenaj kaj memkompreneble verdaj etendaĵoj. Vere ekplaĉis al mi la vilaĝaj kaj kolĥozaj vidaĵoj. Jam MICKIEWICZ (Mickieviĉ) skribis en sia epopeo "**Sinjoro Tadeo**" :

*"Dume transportu mian sopiran animon
Al montetoj arbaraj, herbejoj verdantaj,
Larĝe apud lazura Njemen tiriĝantaj,
Al la kampoj, per greno diversa pentritaj,
De sekalo arĝentaj, de tritik' oritaj,
Kiujn la neĝeblanka poligon' ornamas,
Kie per virga ruĝo trifolio flamas,
Kaj ĉion zonas, kvazaŭ per verda rubando,
Kun maldensaj praarboj la kampa lumrando..."*

Mi ne pli frue ol en Litovio "ekvidis" gravecon de la Mickiewicz-aj vortoj. Tiam mi komprenis, kion volis montri al ni la granda poeto.

*

Celo de mia vojaĝo, Vilniuso, unu el la plej belaj urboj de la mondo, ĉefurbo de Litovio : ĝia antikveco tiel forte fiksiĝis en mia memoro, ke mi neniam forgesos ĝin. Ostra Brama - Pinta Pordego, ĉu estas io pli bela ol ĝi? Mi denove volas citi frazojn de Mickiewicz :

*"Sankta Virgin' ! Vi gardas Ĉenstoĥovon helan,
En Ostra Brama lumas ! Vi, kiu kastelan
Novogrodek defendas kaj pian urbanon !..."*

Dipatrino el Ostra Brama aspektas kiel belega "ora stelo". Lumas super kapoj de la popolo kaj estas ilia reĝino.

Dua grava por mi loko : Rusa - pola - litova tombejo estas fama, i.a. la tombo "Patrino kaj koro de filo". Mi vizitis ankaŭ Monton de Tri Krucoj kaj proksiman kasteleton de Gedyminas. El la kastelo oni povas ekvidi panoramon de Vilniuso. Tio estas loko, kiun homo ne volus preterlasi, ĉar videbla estas la tuta antikveco de la litovia ĉefurbo kaj la verdeco de ĝiaj parkoj. Vidindaj estas ankaŭ preĝejoj de Sankta Anna, Sankta Petro kaj Paŭlo.

*

Post unusemajna restado mi devis forlasi la litovian belecon, riĉecon de pejzaĝoj kaj antikvaĵoj, patrujon de "**Sinjoro Tadeo**" kun revo, ke ankoraŭfoje mi povos reveni.

Do ĝis mia reveno...

Remigiusz GRZELA. (Pollando)

FRAGMENTOJ DE NEKONATA INSTRUO
de Petro USPENSKO (OUSPENSKY)
(resumpecoj)

11

ONI DEVAS ESTI SENREVIĜINTA AŬ HAVI BONAN ESENCON

Por proksimiĝi al ĉi tiu instruo en serioza maniero oni devas HAVI BONAN ESENCON, aŭ NECESAS ESTI ANTAŬE SENREVIĜINTA. Ekzemple:

Se SCIENCULO, necesas ke la SCIENCO senrevigu lin;
se KREDANTO, necesas ke la RELIGIO senrevigu lin;
se POLITIKISTO, necesas ke la POLITIKO senrevigu lin;
se FILOZOFO, necesas ke la FILOZOFIO senrevigu lin;
se TEOZOFO, necesas ke la TEOZOFIO senrevigu lin; ktp.

Sed, atentu, ke kredanto senreviĝis pri la religio, ne signifas ke li perdis la fidon; sed ke li senreviĝis NUR PRI LA RELIGIA INSTRUO ORDINARA KAJ PRI ĜIAJ METODOJ. Tiam li komprenas ke la religio, tia kian oni prezentas al ni ordinare, ne sufiĉas por nutri lian fidon kaj nenien povas konduki lin.

Esti senreviĝinta pri la religio, signifas esti senreviĝinta pri ĝia VIDEBLA PARTO k senti la neceson trovi ĝian KAŜITAN (AŬ NEKONATAN) PARTON!

Esti senreviĝinta pri la filozofio, signifas esti kompreninta ke la ordinara filozofio estas nur: "verŝi la nenion en la malplenen"! Alivorte, ne signifas rezigni pri la ideo ke IO ekzistas IE, sed esti kompreninta ke ĉio kion la homo nuntempe konas aŭ estas kapabla lerni laŭ la kutimaj vojoj, ne estas absolute tio, kio al li mankas.

RESUME: Ĉi tiu instruo estas por kiuj havas bonan esencon, aŭ por kiuj jam serĉis kaj maltrafis!

Neserĉintoj aŭ neserĉantoj en la nuntempo, ne bezonas ĝin. Ankaŭ ne kiuj ankoraŭ ne maltrafis!

LA DEMANDO KIU ZORGIGAS

Ĉiu demando estas bona kondiĉe ke ĝi estu sincera!! Kiu ajn demando (rilate la instruon) povas esti starigita de iu, nur por diri ion, por ripeti tion diritan de aliulo, aŭ tion legitan en libro, aŭ ĉar ĝi estas DEMANDO KIU ZORGIGAS LIN!! Se ĝi estas demando kiu zorgigas

lin, do, oni rajtas doni al li respondon por orientigi lin al la transformista psikologio.

DIVERSAJ HOMAJ TIPOJ

Plej oftaj estas 6 aŭ 7 tipoj de homoj, kvankam fakte estas pli granda nombro. (La aliaj tipoj estas kombinoj de la fundamentaj tipoj).

Laŭ iuj, estas 12 fundamentaj tipoj, k la 12 apostoloj reprezentas tiujn 12 tipojn; sed aliaj subtenas ke estas pli.

Iliaj karakterizoj ne povas esti eksplikitaj! Se ili povus esti eksplikitaj, oni jam delonge estus farinta tion!! La malfacilaĵo troviĝas en tio ke ili ne povas esti difinitaj laŭ la ordinara lingvo; unue, oni devas lerni la lingvon en kiu tio estos ebla. Kaj por komenci "vidi" la tipojn, antaŭe oni devas koni sian propran tion, kaj por tio necesas efektiviĝi la studadon de sia propra vivo.

INDIVIDUA TASKO: Rakonti la propran vivon kun plena sincereco, sen ellasoj, reliefigante tion ĉefan, tion esencan, sen akcesoraj detaloj.

ALIA INDIVIDUA TASKO: (pli simpla) Personoj kiuj influis en nia vivo, kun komentoj.

Rakonti la propran vivon montriĝas kiel: **TUTE NE EBLA TASKO.** Oni prisilentas kelkajn faktojn; la voĉo kaj ĝiaj tonoj ŝanĝas. Ĉi tio helpas kompreni la aliajn; oni rimarkas ke ankaŭ la aliaj kaŝas aŭ prisilentas ion, sed la malsama voĉo kaj la ŝanĝantaj tonoj perfidas ilin!

Ĉi tiuj fiaskintaj provoj ŝuldiĝas al tio ke unue oni devas lerni disigi la Esencon disde la Personeco, nome, tion kio apartenas al ni, disde tio kio ne apartenas al ni, demandante nin el kie venas tia kaj tia el niaj karakterizoj.

Ĝenerale, nenio apartenas al ni: ideoj, konvinkoj, teorioj, konceptoj, kutimoj, ĉio venas el malsamaj fontoj. Ĉi tiu ensemblo konsistigas nian personecon, kaj estas tio kion ni devas malembarasi, forĵeti.

Homo en la vivo (ne ligita al la psikologia laboro) precipe, se li apartenas al la "intelekta" klaso, konsistas preskaŭ ekskluzive el la personeco. Lia esenco ĉesis kreski en juna aĝo, ĉirkaŭ 10 aŭ 12-jara; (en aliaj ĉirkaŭ 5 aŭ 6-jara); ekde ĉi tie, ĉio kion homo aki-

ras, ne apartenas al li; ĝi estas repertuaro de mortintaj aĵoj, prenitaj el la libroj; ĝi estas nur imitaĵo.

La fiasko rakonti la propran vivon demonstras ke oni ne konas sin mem, kaj ne komprenas kion signifas: **ESTI SINCERA!** Oni estas tiel kutimiĝinta mensogi (al si mem kaj al aliaj) ke oni trovas nek la vortojn nek la pensojn, kiam oni volas diri la veron. Diri la tutan veron pri si mem estas tre malfacile. (Antaŭ ol diri ĝin estas necese koni ĝin, k koni la precipan trajton.)

PRI LA REENKARNIĜO

Por ĉio ekzistas eblecoj, sed nur dum limigita tempo! La transformista psikologio **NENION DIRAS** pri la reenkarnejo (ripetiĝo aŭ eterna reveno), k ĝi konsideras nur la vivon, kiun ni konas.

La homo devas vidi kiel ripetiĝas la aĵoj en unu vivo, k klopodi transformiĝi por eskapi de ĉi tiu ripetiĝo!

La reenkarnejo, eble, aŭ sen eble, absolute ne ekzistas!

RIMARKO: La Reenkarnejo estis manio de Uspensko!!! Kaj pli ol foje Gurdiefo provis kuraĝigi lin. Kaj la maniero kuraĝigi iun, estas rakonti al li anekdotojn, aŭ koni lian preferatan temon, kaj paroli al li pri tio!

ROLO DE L' TIPO EN LA RILATOJ DE VIRO KAJ VIRINO

Se la homoj povus vivi en sia Esenco, iu tipo de viro ĉiam trovas la tipon de virino kiu korespondas al li!! (Neniam estus misunuiĝo de tipoj.) Sed la homoj vivas en sia Personeco, kiu havas siajn proprajn gustojn kaj interesojn, malsamajn de la gustoj kaj intereso de la Esenco. Tiukaze la Personeco estas la rezulto de l' misfunkciado de l' centroj. Tial la Personeco volas kion la Esenco ne volas kaj inverse.

Kaj ĉi tie komencas la konflikto inter Personeco kaj Esenco. (Unu kaj alia havas nenion komunan) Aliflanke, la 2 Esencoj, tiu vira k tiu virina, devas kunvivi... K ili malamas unu la alian. En ĉi tiu kampo ne estas ebla komedio: La Esenco, la tipo, finfine alprenas la ordon povon kaj decidas. K nek per rezonado, nek per kalkulo, io fareblas. Eĉ ne per "amo", ĉar laŭ la fakta senco de l' vorto, la meĥanika homo ne kapablas ami; en li, **ĜI AMAS AŬ ĜI NE AMAS.**

ROLO DE L' SEKSO KIEL PRECIPA FORTO MOTORA DE LA TUTA MEĤNIKECO.

La sekso ludas grandegan rolon en la subtenado de la meĥanikeco de l' vivo. Ĉio, kion la homoj faras, havas rilaton kun la sekso: politiko, religio, arto, teatro, muziko, ĉio estas sekso.

Ĉu vi pensas ke la homoj iras en preĝejon por preĝi, aŭ en teatron por vidi iun novan teatraĵon? Ne, ĉi tiuj estas pretekstoj. La precipa afero ĉu en la preĝejo ĉu en la teatro, estas ke tie povas renkontiĝi virinoj kaj viroj. Jen la centro de gravito de ĉiuj kunvenoj. Ĉu kio impulsas la homojn al kafejoj, restoracioj, ĉiaj festoj? Unu sola aĵo: la sekso. Jen la ĉefa fonto de energio de la tuta meĥanikeco. Ĉiu revado, ĉiu hipnoto devenas el ĝi.

Kiam la sekso konscias pri si mem, kiam ĝi ne rifuĝas sin malantaŭ pretekstoj, jam ne temas pri meĥanikeco. Oni jam ne mensogas al si mem.

Ĉi tiu stato de aĵoj ne povas esti ŝanĝita. Ni ne povas ŝanĝi la 48 ordojn de leĝoj, sed oni povas liberiĝi de granda nombro de ili, nome, ke ESTAS EBLECO ŜANĜI LA STATON DE AĴOJ POR ONI MEM. Ni povas eskapi de la ĝenerala leĝo, sed la ĝenerala leĝo ne povas esti ŝanĝita!

ROLO DE L' SEKSO KIEL PRECIPA EBLECO DE LIBERIĜO (=NOVA NASKIĜO)

La sekso estas la ĉefa motivo de nia sklaveco, sed ankaŭ la ĉefa ebleco de liberiĝo (=nova naskiĝo). La "nova naskiĝo" dependas tiom de la seksa energio, kiom la fizika naskiĝo k la propagado de la speco.

La h12 (SI 12), kiu reprezentas la finan produkton de transformo de manĝaĵo en la homa organismo, estas la materio per kiu la sekso laboras kaj produktas. Ĝi estas la "semo" aŭ la "frukto". SI 12 povas pasi al DO en la sekva oktavo per aldona ŝoko (farita en MI 12 en la oktavo de impresoj). Sed ĉi tiu ŝoko povas esti de duobla naturo kaj du malsamaj oktavoj povas komenci: unu ekster la organismo, kaj alia en la organismo.

OKTAVO EKSTER LA ORGANISMO: La unuigo de SI 12 maskla kaj femala okazigas la oktavon ekster la organismo, kiu sendepende disvolviĝas kiel nova vivo.

OKTAVO INTERNE DE LA ORGANISMO: (Ĝi fariĝas sen la unu-

igo de la du principoj maskla kaj femala). Ĉi tiu nova interna oktavo estas la naskiĝo de la astrala korpo (de pli subtila konsisto ol tiu fizika). La emanajoj de la materio SI 12 penetras ĉiujn ĉelojn de l' fizika korpo kaj saturas ĝin. Kiam la saturado atingas la necesan gradon, SI 12 komencas kristaliĝi. Ĉi tiu kristaliĝo ekvivalentas la formigon de l' astrala korpo. Ĉi tio estas kion en alĥemio oni nomas transformiĝo aŭ transmutado de fizika korpo en astralan korpon, de krudaĵo en subtilaĵon, de malsatindaj metaloj en oron. (Sed atenton, ĉi tion oni atingas, se oni havas normalan, sanan organismon!)

TRANSMUTACIO DE LA SEKSA ENERGIO K MISUZOJ DE LA SEKSO

Por la transmutado, en kelkaj kazoj necesas la seksa abstinado, sed en aliaj, ne! Generale, la seksa abstinado ne estas rekomendinda. Normala vivo postulas normalan seksan kontentiĝon.

MISUZOJ DE LA SEKSO

Rilate la seksan abstinadon oni devas kompreni ke la plej granda malbono kaj la ĉefa faktoro de nia sklaveco ne estas la sekso mem, sed la MISUZO DE L' SEKSO. Ne temas pri seksaj eksceso aŭ perversioj. (Ĉi tiuj estas nedanĝeraj formoj de seksa misuzo). Temas pri la mislaborado de l' centroj en siaj rilatoj kun la seksa centro, en aliaj vortoj, de la aliaj centroj agantaj per la seksa centro; por esti eĉ pli precizaj, la seksa centro funkcias per energio prunedonata de la aliaj centroj kaj la aliaj centroj funkcias per energio prunedonata de la seksa centro.

La seksa centro laboras per H 12 (SI 12), kvankam ĝi malofte faras tion kaŭze de iuj anomalioj:

1-e En la seksa centro same kiel en la superaj centroj ne estas negativa parto. En la aliaj centroj estas du duonoj: 1 pozitiva kaj 1 negativa: jesa kaj nea en la intelekta centro; agrablaj kaj malagrablaj sentoj en la emocia centro; kaj agrablaj kaj malagrablaj sensacoj en la instinkta-motora centro. Sed tia divido ne ekzistas en la seksa centro. Ne estas pozitiva kaj negativa partoj en ĝi. Ne estas malagrablaj sentoj aŭ sensacoj en ĝi: Jen estas agrabla sensaco, jen estas nenio -foresto de ĉiu sensaco, kompleta indiferento.

Ĉio, kio koncernas la sekson, devus esti agrabla aŭ indiferenta. Malagrablaj sentoj aŭ sensacoj, ĉiuj venas el la emocia centro aŭ el la instinkta-motora centro.

Ke la seksa centro laboras per H 12 signifas ke ĝi estas pli forta k pli rapida ol ĉiuj aliaj centroj. Fak te la sekso regas ĉiujn aliajn centrojn.

En la ordinaraj cirkonstancoj, nur la "bufroj" povas bridi ĝin, malhelpi ĝiajn normalajn manifestiĝojn, sed ili ne povas detrui ĝian energion, kiu transiras al la aliaj centroj, k esprimiĝas tra ili; en aliaj vortoj, la aliaj centroj ŝtelas al ĝi la energion kiun ĝi mem ne uzas.

En la laboro de l'intelekta, emocia k motora centroj oni rekonas la energion de l'seksa centro pro partikulara "sapor": iu ardo, iu fervorego, iu impetego (necesaj).

ĤKION FARAS LA CENTROJ PER LA ENERGIO ŜTELATA AL LA SEKSA CENTRO?

LA INTELEKTA CENTRO, kiam alfluas la energio de la seksa centro (ne nur okupiĝas pri filozofio, scienco, politiko, sed ankaŭ ĉiam kontraŭbatalas ion, diskutadas, kritikadas, kreante novajn subjektivajn teoriojn.

LA EMOCIA CENTRO predikadas la Kristanisman, la abstinadon, la asketisman, la abomenon al la peko, la turmenton de l'pekantoj, la eternan fajron de l'infero. (Kaj ĉion ĉi tion per la energio de l' sekso!) Aŭ ĝi subtenas revoluciojn, rabas, bruligas, murdas, per ĉi tiu sama energio ŝtelata al la seksa centro.

LA MOTORA CENTRO pasiĝas per la sportoj, superas rekordon, saltas barilojn, grimpas montojn, luktas, boksas, batalas, ktp.

Ĉi tiuj ekzemploj de la MISUZO DE L'SEKSO elmontras ke la malsuperaj centroj ne kapablas krei ion UTILAN per la energio de l'seksa centro. La homo sentas la SENUTILCON de l'komencita laboro!

2-e Kiam la energio de l' Sekso estas ŝtelata de la aliaj centroj kaj malprofitata en senutila laboro, restas nenio por ĝi mem, k tiam ĝi devas ŝteli la energion de aliaj centroj, kiu estas de malsupera (pli kruda) kvalito; kontraŭe laborante per H 12 ĝi ricevas fajnman nutraĵon de impresoj, tre grava por la produkta do de superaj hidrogenoj. (K por la normala funkciado de l'organismo!)

Ĝia unuiĝo kun la intelekta centro estigas eksceson de imagado k inklinon kontentigi sin per ĉi tiu imagado. Ĝia unuiĝo kun la emocia centro kreas sentimentalcon, aŭ ĵaluzon k kruelecon. Ĉi tiuj estas aliaj misuzoj de l' sekso!

CENTRO DE PERMANENTA GRAVITO

En ĉi tiu etapo de la instruo ne eblas ekspliki kiel oni povas eviti la misuzojn de l'sekso. Unue necesas korekta laboro pri si mem kaj koni funde la strukturon de l'homa maŝino. Oni devas komenci per la kreado de: CENTRO DE PERMANENTA GRAVITO; kiam ĉi tiu centro de permanenta gravito estas kreita, ĉio cetera, subordiĝante al ĉi tiu, iom post iom organiziĝas.

La asimilado k aplikado de ĉi tiu instruo kreas la centron de permanenta gravito, kaj kondukas la homon al ĝenerala ekvilibro. La seksa centro uzante sian propran energion (H 12) situiĝas je la nivelo de l'supera emocia centro, k ĉiuj aliaj centroj restas subordigitaj al ĝi, nome, korekte laboras, en sia loko k per sia propra energio!

LA NE PERFORTO ESTAS TIO PLEJ BONFARA KAJ EFIKA!

(Resumpecoj el la 13^a Ĉapitro)

